

# bulteno

## de Esperantista Klubo en Brno 3/91 (196)

**77. světový sjezd esperanta** se uskuteční v roce 1992 ve Vídni ve dnech 25.7.- 1.8. K oslavě 400. výročí narození J. A. Komenského uspořádá Český esperanstký svaz v Praze oficiální předkongres.

**Na letošní 76. světový sjezd esperanta** v norském Bergenu (27.7. až 3.8. se přihlásilo na 1800 osob, předpokládá se však, že počet účastníků překročí 2000. Nejpočetnější delegaci bude mít již tradičně Polsko, avšak velké skupiny jsou ohlášeny i z Estonska, Lotyšska, Litvy a Ukrajiny.

**O následující sjezdy esperanta** mají zájem a hlásí se Valencie (1993), Seul (1994), Tampere (1995) a Budapest (1996).

**43. sjezd Mezinárodní federace esperantistů-železničářů IFEF** se konal ve dnech 11.-17.5.1991 v Olomouci. Přijelo na 400 účastníků z 21 zemí. V sobotu 11.5. se uskutečnila tisková konference, na níž členové předsednictva a Dr. Ing. Petr Chrdle, předseda ČES, odpověděli na řadu dotazů. Téhož dne přijel největší počet účastníků. Přijeli ve zvláštních vagónech z Vídne a Prahy a byli na nádraží uvítáni krojovanou hudbou a tradičně pohoštění chlebem a solí (chlebem zvláště napečeným).

V neděli se konaly dvě bohoslužby - katolickou celebrou převor dominikánů P. Řičica a ekumenickou P. A. Burkhardt ze SRN. Potom se účastníci odebrali na náměstí, kde na ně čekaly mažoretky a s hudbou se šlo do parku k Esperantskému stromu a památníku, s jejichž historií seznámil přítomné dr. V. Mohapl. Poté proběhlo slavnostní zahájení 43. sjezdu. Po projevech oficiálních zástupců následovaly pozdravy reprezentantů z jednotlivých zemí. Mužský sbor Haná zazpíval klasické české písně A. Dvořáka, J. B. Foerstra, L. Janáčka, B. Martinů, J. Nešvery a B. Smetany. Večer byl velký kulturní pořad: smyčcové kvarteto, pěvecký sbor Dvořák, účinkovali operní pěvci A. Farnová, M. Smyčka, a J. Vích, E. Seemannová aj. Novým čestným členům, dr. Mohaplovi a M. Bartovské, byly předány diplomy ČES, čestným členem byl jmenován J. Babička. V další části sjezdu přednesl Ing. Petr Chrdle hlavní sjezdové téma: Transevropský železniční koridor sever - jih z hlediska Čs. státních drah. (Koridor by umožnil rychlou přepravu zboží ze severu Evropy až do severní Afriky.) Následovalo deset aktuálních přednášek. Večer byl slavnostní banket. Dr. Mohapl seznámil účastníky s tisíciletou historií Moravy a dětský sbor Přeřováček zazpíval - i v esperantu.

Uskutečnily se zájezdy do Rožnova, na Velehrad, do Strážnice, na Bouzov a do Kroměříže. Proběhly samozřejmě i pracovní schůze sekcí, např. zasedání terminologické sekce atp. Dne 17.5. byl 43. sjezd IFEF slavnostně zakončen - na rozloučenou zahrála na nádraží dechová kapela železničářů.

Příští sjezd bude v roce 1992 v Munsteru.

Zkráceno dle sjezdového Bultena, které redigoval M. Malovec.









De l' amo al Moravio mi estas kaptita,  
ĉiujn arĝent-talantojn superas mia lando.

Ivo Odehnal: Kanto pri Grandmoravia orelingo

Granda Moravio bazas sur tri riverbranĉoj. Fiŝplenaj fluoj kun netrapaseblaj arbaregoj kreas por la fekunda lando naturan protekton. Unue volas ĝin subigi al si sovaĝa Avaro, poste klopodas pri tio nesatigebla Franko, ebria de la mondhegemonia manio de Karlidoj. La moravia regiono kunigita sub unu regnestra glavo obstaklas la malamikan ekspansieron. Ĝi spitas eĉ tiam, kiam al la akra ĝermana armilo aldoniĝas la kristana kruco de bavaraĵoj. Strebado de la Franka reĝo kaj de klerikaro kunfandiĝas al unu: frakasi la florantan slavan dominion.

Kiel ŝtorma nuboj falonta, tiel same konstante minacas al la Granda Moravio fatala heredaĵo de la slava sango. Malkonkordo kaj ĵaluzo de ĝiaj regantoj: Pribina, Mojmir, Rostislav kaj Svatoŝluk. La princo tronon ili suriras dum strangaj cirkonstancoj: sur la manoj gluiĝas sango kaj en la okulo senbrila lumo de perfido.

*Antaŭparolo al la romano*

### **František Neždi: RATISBONAJ VERDIKTOJ**

Moravia princo Rostislav estis forta regnestro, brava militisto, prudenta politikisto, kiesmerite Moravio atingis suverenecon. Sciante, ke por sendependeco necesas ankaŭ eklezia sendependeco, li venigis el Bizanco evangeliistojn Cirilon kaj Metodon, kiuj disponigis al nia nacio propran skribon pli frue ol ĝin havis pliparto de la ceteraj eŭropaj nacioj. La fratoj el Tesaloniko metis fundamenton al nia kulturo, Rostislav en alianco kun Bizanco firmiĝis sian pozicion, sed perfido de lia nevo Svatoŝluk, avidanta la regadon, preparis al Rostislav kruelan finon. Reĝo Ludoviko igis lin blindigi kaj ĵeti en ian karceraĉon.

Fragmento el la romano:

Kiam mi estis en senĉesa mallumo, nek komenciĝanta, nek finiĝanta, mi devis gardi la kranion, por ke ne venku ĝin frenezo. Tio signifas grandan strebadon, sed la superhoma peno evidentigis, ke ankoraŭ mi ne troviĝas surfunde, ke mi volas vivi. Mia terurega stato komence ŝanĝis min je sensprita besto, ne scianta tempo-nocion. Mi statis pli malbone ol bestaĉo. Ankaŭ ĝi neniam scias, ĉu regas mateno aŭ vespero, tago aŭ nokto. Nur en komuneco de homoj ĝi ekkonas laŭ laboro, kiam por ĝi komenciĝis tempo por dormo, manĝigo kaj trinkigo.

Sed min ili punis tiel, ke min apartigis de homoj. Ili lasis min en ia tenebra ĉelo (por mi ĉio ja estis tenebra kaj nevidebla), ĵetis post min panon, metis al pordo ujon kun akvo, tiun trinku, aŭ se vi volas, prilavu en ĝi vian pigran korpon, kiu cetere estas kondamnita al perejo. Mi ekkonis do nek tagon nek nokton. Mi kuŝiĝis sur lito, kiun mi perceptis nur perpalpe kaj ĝi iĝis mia kunulo, ĝi konis mian koleron kaj malesperon, lacon, mian senpovan ridadon, sed ne helpis al mi difini la tagan kaj noktan tempojn. Mi pripalpis la muron de mia karcero, ĝi konsistis el fridaj ŝtonoj, tio alkondukis min al freneza penso. Mi paŝmezuris laŭeble la plej grandan distancon disde la muro, kliniĝis antaŭen (foje aŭtune ni observis kun Těšivoj en proksimeco de Maršav-fortikaĵeto duelon de du oldaj cervaj maskloj), impete mi ekkuris kun la nudigita kranio kontraŭ la ŝtonblokojn. Ĝi estis terura karambolo, mi senkonsciiĝis. Kiomlonge mi kuŝis sur la tero ensange, mi ne scias, ĉar provosoj iradis kun manĝaĵo nur tre malofte.

Ekde tiu tempo mi ĉesis pensi pri memmortigo. La provoso, kiu portadis al mi manĝaĵon, tiam grobe demandis min, kion vi faris, frenezulo? Sur la tero kaj sur ŝtono estas multe da sekiĝinta sango. Sur la kranio vi havas nigran vundon. Tiel vi ne restos longe ĉe ni, kaj tio ĉagrenus nin, se ni trovus vin iun tagon mentonsupre. Lia moko redonis al mi aplombon. Ne, nenikaze mi atencos mian vivon. Dum mi spiras kaj moviĝas, mi mem estas konstante mi, kaj kiu scias, kio povas okazi.

Mia aplombo revenigis al mi konscion, ke tamen mi estis regnestro de granda lando, de

Moravio kun Nitra-regiono (mi ekvidis antaŭ mi la perfidan Svatopluk kaj ekstremis pro abomeno), ke fakte senĉese mi restas regnestro, malgraŭ tio, ke ili blindigis min kaj enpuŝis en ian nekonatan karceracon. Kvazaŭ kun tiu pensao estus revenanta certeco al mi. Mi vivis ne vane. Ion mi volis kaj ion amis. Sed nenion kriman. Kiel faras tion la Ratisbonaj, ĉu la reĝo aŭ episkopoj, nenion fremdan mi volis. Mia lando estis fariĝonta firma distrikto, kiel ekzemple Velehrad, Luh, aŭ Divín, insulo en la franka maro, lando, kie la homoj parolus la lingvon, kiun instruis al mi la panjo, kie oni skribus per skribo. Ni estas Slavoj, vi Germanoj, egalulo kun egalulo, konsciigu al vi, ke ankaŭ ni rajtas havi lokon sub la suno. Ne trudu al ni viajn diojn, ankaŭ ni kristaniĝos, kiel vi, sed sen viaj kuratorado kaj perforto. Se la kredo levos nivelon de mia nacio inter la ceterajn helajn naciojn, estu tiel, sed sen via glavo kaj skurĝo. Ne venadu en nian landon kiel rabaj bestoj. Ne prirabadu nin, ne predu, ne forkondukadu niajn homojn en kaptitecon, ĉar poste ni devas repagi malbonon per malbono, aĉe tion refutadis al ni la noblaj fratoj el Bizanco. Jes malbonon per malbono!

Tia konsiderado retenis mian vivadon. Multfoje mi kalkulis enmense ĉiujn miajn burgetojn kaj iliajn estrojn, mi imagadis al mi ilian similecon kaj voĉtembron, mi rememorigis enmense, kiu estis fidela al mi kaj kiu estis perfidanta, mi parolis afable kun ili, aŭ mi kompromisis kun ili, aŭ disputis. Sole mi forpuŝadis de mi imagon pri homoj, kiuj portas sur sia konscienco mian tenebran sorton. Svatoplukon, Ludovikon, Germanon, Karlomanon kaj bavarajn episkopojn.

Perfingre mi kalkulis konstante ree ankaŭ ordinarajn numerojn, mi kantis al mi, recitadis al mi latinajn preĝojn (kaj ĝuste tiujn, kiujn lernigis min en mia junaĝo Bavaroj, mi mokis tion kaj furiozis), mi rememoradis, kiom da paganaj idoloj estis en mia lando antaŭ alveno de la fratoj kaj kie ili staris. Per tio mi plenigadis al mi la senfinan tempon inter dormo kaj manĝo kaj forpuŝadis de mi senton de sufoka soleco.

(Esperantigis J.V.)

Klub esperantistů  
pošt. příhr.154,  
657 54 Brno 2

Schůzky dle programu v úterý večer ve Spojklubu, Šilingrovo nám. 3/4, boční vchod z ulice Dominikánské. Věstník Klubu esperantistů v Brně je vydáván od roku 1952.

Toto číslo připravili: Milena Picková, Josef Vondroušek, Zdeněk Hršel, Miroslav Malovec, Karel Daněk.